Programo de la Tria Renkontiĝo en Žirovnice 01.-03.06.2012

Vendredo 01.06.2012:

Ĝis la 14h00 alveturoj, loĝigoj.
15h00 Kafumo kun projekciado de la okazintaj aranĝoj.
18h00 Vespermanĝo.
19h00 Vespera preĝo en la loka kapelo.
20h00 Pritrakto de la aktualaj aferoj de la sekcio kaj IKUE.

Sabato 02.06.2012:

7h00 Matena preĝo.
7h45 Matenmanĝo.
9h00 Ekskursa tago. Se ĝin oni povos realigi pere de aŭtomobiloj de la partoprenantoj, okazos vizitoj de Kostelní Vydří kun sankta meso, tagmanĝo, Telč kaj Dačice.
La kunveturantoj monkontribuos por peraŭtomobila vojaĝo.
Se ĝin oni devos realigi pertrajne, do okazos vizito de la urbo Jindřichův Hradec.
19h00 Vespermanĝo.
20h00 Vespera preĝo.
20h30 Prelego kaj diskuto pri la prelegita temo, interbabilado kun kantado.

Dimanĉo 03.06.2012:

7h30 Matenmanĝo.
8h00 Prelego aŭ projekciado de la spirita programo.
11h00 Sankta meso en la paroĥa preĝejo.
12h00 Tagmanĝo.
Fermo de la renkontiĝo, forveturo hejmen.

La programo laŭbezone restas malfermita por ŝanĝoj kaj kompletigoj.

Por loĝigo restas neŝanĝita prezo: 200 CZK (Kč) por unu tago.
Ankaŭ por manĝoj restas malaltaj prezoj.

La urbeto Žirovnice estas situanta en ĉarma ondumanta regiono de Bohemia-Moravia Montetaro proksime de la urbo Pelhřimov. Žirovnice situas ĉe fervoj-linio Jihlava – Jindřichův Hradec. En fervojstacio Počátky-Žirovnice, kie oni eltrajniĝas, haltas ankaŭ rapidtrajnoj. Por atingi du kilometrojn malproksiman urbeton Žirovnice funkcios el la fervojstacio peraŭtomobila transporto de tiuj, kiuj tion sciigos en la aliĝilo. La urbeto Žirovnice estas ankaŭ atingebla perbuse, ankaŭ per buslinio el Praha. Ĉiuj aliĝintoj ricevos ĝustatempe antaŭ la aranĝo praktikajn informojn. La aliĝilon bv. sendi ĝis la 25-a de majo.